# Esperanto in der UN-Stadt Wien

**Nach New York und Genf ist Wien die dritte UN-Stadt und seit 1978 gibt es einen eigenen Bereich im Bezirk Donaustadt, wo ein Gebäudekomplex steht inmitten eines Territoriums, das ausschließlich in der Verwaltung der UN-Behörden liegt. In diesem Bereich werden die Agenden der UN abgewickelt, herausragend die IAEO (Internationale Atom-Energie Organisation). Neben dieser Tätigkeit, die eine Vielzahl von Konferenzen mit einschließt, haben auch die NROs (Nichtregierungs-Organisationen), die in offizieller Beziehung zur UN stehen, die Möglichkeit, ihre Tätigkeit für die Ziele der UN sichtbar zu machen.**


Bernhard Tuider


Hans-Michael Maitzen

Eine dieser internationalen Organisationen ist die Universala Esperanto-Asocio (UEA), seit dem Beginn in Wien vertreten. Seit 1978 bin ich der ĉefreprezentanto, habe dabei eine Reihe von Mitarbeitern gehabt, wie z.B. Herbert Mayer, das Ehepaar Klag, Gregor Hinker, Olga Maitzen, Stella Maitzen. Seit Beginn dieses Jahres ist mein Stellvertreter Bernhard Tuider, der Präsident der AEF. Er hat bereits im Herbst letzten Jahres einen Vortrag über den Friedensnobelpreisträger 1911, Alfred Hermann Fried, gehalten, und zwar im Rahmen des NRO-Komitees für Frieden in der UN-Wien.

Das war Anfang November und am 7.Dezember 2011 wurde ich bei den Wahlen für den Vorstand dieses Komitees zum Vorsitzenden für die nächsten zwei Jahre gewählt. In diesem Komitee sind Delegierte aus 25 internationalen Organisationen vertreten, die das Thema Frieden in ihrem Statut haben.

Ich empfinde es als Anerkennung für die Bestrebungen der UEA, dass ich als deren Vertreter diese Aufgabe erhalten habe. Ich habe bereits angekündigt, dass wir als UEA-Vertreter in diesem Jahr 2012 eine entsprechende Veranstaltung zum Thema "125 Jahre Esperanto - eine der ersten Friedensbewegungen der Welt" durchführen werden.

**Dr. Hans-Michael Maitzen**

**Resumo:**
D-ro Hans-Michael Maitzen estas ekde 1978 ĉefreprezentanto de UEA ĉe la Unuiĝintaj Nacioj en Vieno. Ekde tiu ĉi jaro Bernhard Tuider (prezidanto de AEF) estas lia anstataŭanto. Lastaŭtune Tuider prelegis pri Alfred Hermann Fried okaze de la NROj-komitata kunsido por paco en Vieno. Decembre de 2011 Maitzen estis elektita estro de tiu komitato por la du venontaj jaroj. La komitato konsistas el 25 delegitoj de internaciaj organizoj, kiuj pritraktas la temon „paco“ en siaj statutoj. Maitzen anoncis, ke li planas fari aranĝon pri la temo „125 jaroj de Esperanto – unu el la unuaj pacmovadoj de la mondo“.

## Nekonata Esperanto: Ĉu framasonoj? ☺

Viena Esperanto-rondo vizitas je la unua fojo novan gastejon por regula renkontiĝo. La unua Esperantisto eniras la etan tradician gastejon en la kvara Viena distrikto kaj serĉas la apartan ĉambron. La kelnero demandas la novan gaston pri lia deziro, tiu respondas, ke li volas viziti la renkontiĝon de la Esperanto-federacio. La mezaĝa kelnero, ne kompreninte la vorton Esperanto, en tre larĝa Viena dialekto: „Kja dom-prizorgant' ?“ - Gasto: „Ne, ne, mi ne estas de dom-prizorganto, mi partoprenos la aranĝon de Esperanto-parolantoj, kiuj rezervis la apartan ĉambron por hodiaŭ.“ La kelnero kapklinas komprenoplene kaj montras la vojon. Enirinte la ĉambron kaj demetante sian mantelon la gasto denove ekvidas la scivoleman kelneron: „Kaj kjo esdas Esberand'?“ La motivita Esperantisto sciigas mallonge pri la Internacia Lingvo, ties celo kaj historio. La kelnero senstreĉe diagnozas kun zorgoliberigita rideto: „Nu bon'... gravaz ja, ke vi ne esdas framasonoj!“ Pri la framasonoj en la riĉa historio de Esperanto nia gasto preferas silenti kaj afable reridetas.

Do, kara leganto, mi proponas, ke ni ne zorgu pro la nuna neakcepto de Esperanto, ni zorgu pri ĝia konateco – eĉ kaj precipe inter kontraŭ-framasonaj kelneroj.

**(U.S., laŭ rakonto de gasto)**